

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Decembro 2017

(49a jaro)

N-ro 176

Esperanto Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Unua skizo-propono

La poŝta stampo



Uzita 26. 8. 2017 en 75025 POLICORO

kun teksto:

84° CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO

84a ITALA KONGRESO

(26 08 – 02 09 2017)

Mezuro: 36x31mm

Grafikisto: Giovanni Zanaboni

Temo de la kongreso estis:

“Kulturo Kaj Komunikado en Eŭropo”.

Abundis prelegoj, muzikaj prezentoj, ekskursoj.

Al la kongreso aliĝis 219 personoj.

En la urba blazono: Herkulo (Heraklo)



La kongresa bildkarto de la 84a Itala Esperanto-Kongreso



**Aerpoŝte sendita kongresa koverto
kun kongresaj ipm kaj memorstampo**
Sendita: 3.11 Alvenis: 6.11.2017

**Okaze de la 104a Japano Esperanto-Kongreso
en Jokohamo, 3 – 5 Novembro 2017, aperis:**

Memorkoverto

Memorkarto

Poŝta memorstampo

Diametro: 32 mm, ruĝa

Dato: 3. IX.17

Bildo: Lumturo, ŝipo

Serio de 4 individuaj pm:

Nominalo 62 enoj, 32x38 mm

Nominalo 82 enoj, 32x38 mm

Nominalo 82 enoj, 40x47 mm

Nominalo 82 enoj, 32x50 mm



**Koran dankon al niaj amikoj Maekaŭa kaj Suzuoki pro senditaj informoj
kaj materialoj.**

En la ĉefa poŝtejo de Senta (SERBIO)
funkciis 23an de Junio 2017
porokaza poŝtstampilo kun teksto:

**VERDAJ AMIKAJ TAGOJ
„KORMORANOJ ANKORAŬ
NE REVENAS“
NANDOR GION**



Stampo: 33 mm



Memorkarto 2016



Memorkarto 2017

Nandor Gion (n. 1941 en Jugoslavio – m. 2002 en Szeged, Hungario),
devenis el hungara familio, estis verkisto kaj ĵurnalisto.

Verkis i.a. „Kormoranoj ankoraŭ ne revenis“.

Tradukis en E: Huszar Laszlo.


Koran dankon al s-ano Imre BELEC en SENTA!




En la poŝtofacejo
49283 Hraščina –Trgovišće, Kroatio
15an de Septembro 2017
oni uzis porokazan stampon
„Renkontiĝo de
Esperantaj Verkistoj“.
Mezuro: 30 x 30 mm

Apude la origina skizo,
trovita en la reto

Kunlabore kun la Esperanto-
Societo „Trixini“ Hraščina
Filatela societo Zaboky prezentis
Esperanto-ekspozicion.



Filatela koverta, eldonita de la Filatela Klubo ZABOKY
Desegnis: Nenad Opačić



De 1995 ŝia familia bieno „Njeguš“ en la vilaĝo *Hraščina-Trgovišće* servas por Esperanto-aranĝoj.



ŜTIMEC, Spomenka.

Nask. 1949. Kroatino.

Diplomito pri la germana kaj franca lingvoj. Naskiĝis en Orehovica.

Lernis Esperanton deksesjara. Aktivis en TEJO kaj UEA, interalie organizis la IJK-on de Sarajevo en 1973.

Estis estrarano de UEA pri kulturo dum 1989-1992, lanĉis la Tagon de Libro dum la UK.

Akademiano. Verkis romanojn, novelarojn, teatraĵojn kaj vojaĝopriskribajn rakontojn.

Tradukis pupateatraĵojn. Kunlaboris en "Heroldo", "Esperanto", "El popola Ĉinio", "Monato", k.a. gazetoj.

Redaktis antologiojn. Verkis pri Esperanto en nacilingvaj gazetoj.

Gvidis kursojn, interalie en Usonaj universitatoj.

Gastprelegis en multaj landoj.

Ŝia plej konata kaj eble plej grava verko estas la romano *Ombro sur interna pejzaĝo*, kiu kun delikata psikologio prezentas disiĝon de kunvivanto.

Dum pluraj jaroj ŝi uzis Esperanton kiel hejman lingvon, kaj ankaŭ uzis ĝin profesie en la Internacia Kultura Servo de Zagrebo dum 1972-1994. Organizinto de Pupteatraj Internaciaj Festivaloj. Sekretario de Kroata Esperanto-Ligo de 1995.



Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/autor/stimec.html>



INTER(nacia) FEST(ivalo) 2017 en Bjelovar, Kroatio



En 2017 okazis unuafoje tiu festivalo, kun espero de la organizantoj ke ĝi fariĝos tradicia. Ĝi estis parto de la urba festo Bjelovara Kultura Somero, aŭspiciata de Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora. La ĉefa organizanto estis Bjelovara Esperantista Societo, sed grandan meriton havas ankaŭ la esperantisto Josip Pleadin el Đurđevac.

En la festivalaj sakoj kuŝis senpaga ekzemplero de la filatela memorkoverto. En la akceptejo haveblis pliaj kovertoj je 20.00 kunaĵoj.

Speciala poŝta stampo de INTER FEST estis uzata en la poŝtoficejo 43000 Bjelovar la 7an de Aŭgusto 2017.

Korea Esperanto Asocio eldonis kongresajn memoraĵojn!



Sur la sekvaj paĝoj ni prezentas al vi vicon da kongresaj memoraĵoj el la 102a UK en Seulo.

Dankon al Korea Esperanto-Asocio, al KANG Hongu, Edvige Tantin kiu realigis dezirojn de nia prezidanto Elda Dörfler.




La kongresa tutaĵo-poŝtkarto, nominalo 300 uonoj, poŝte sendita kun aldona kongresa ipm pro eksterlanda tarifo.



La poŝtaj stampoj en la Seula Universala Esperanto-Kongreso




La koreia poŝto feliĉigis la kongresanojn per disponigo de nuliga stampilo kun bildo de Zamenhof kaj teksto pri la UK. Proponis tion LKK-ano KANG, membro en nia ELF/AREK. Kaj ĉiu el la 1300 kongresanoj rajtis funkcii kiel poŝtisto, ĉar la stampilo estis de ĉiu, pli aŭ malpli kvalite, libere uzebla. Ni trovis stampojn kun du kaj kun tri signoj por la poŝtoŝtupo. Tria var. kun 4 signoj eble ne realiĝis (supre la meza).



Jen du tut-pk kun la kongresa stampo de 21.7. kaj kun du signoj por la poŝtejo. Dekstre la oficiala tut-pk

En posedo de James Piton



„... La malsupra, kies du flankoj videblas, estas ordinara tutaĵo, al kiu oni aldonis, per laserkolora printilo, la bildojn de Zamenhof (kovrante la spacon por adreso de sendinto) kaj dorse la landojn, kie UK iam okazis, per la sama tekniko. Do laŭ miaj kriterioj la dua valoras nur pro la memorstampo...” (JRP)



Kongresa bildkarto
„Folkloro danco“,
dorsflanke kun fotoj
de KANG Hon-gu.
Kun la kongresa ipm kaj
Zamenhof-jubilea ipm,
kaj kun stampo
de 27.7.2017
Tiu posedas tri signojn
por la nomo de la poŝtejo.

Niajn numismatojn ĝojigis ĉi-jare vico da novaĵoj, se ilia monujo eltenis!



Kongresa medalo 102-a Universala Kongreso

Arĝentkolora, 65 gramoj, diametro: 45 mm, dika: 5 mm

Eldonita de Korea Esperanto-Asocio

Estis havebla en la Libroservo de la UK.

Averso: La kongresa emblemo

kun teksto: La 102-a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, SEULO 22-29 JULIO 2017

Reverso: Portreto Zamenhof

kun teksto: LA 100-a MORTODATREVENO



DE LUDOVIKO ZAMENHOF

Kaj la kongresanoj ĉi-jare ricevis metalan kongresan insignon.

Mezuro: 25x38, pezo: 12 gr.

Bildo: celofana „insignujo“





Konatiĝis 5 kongresaj bildkartoj.



Surprizo el Bydgoszcz, Pollando

Tie ekzistas apud ESPERANTOTUR de Grzembowski i.a. ankaŭ ne-esperanta fervoj-filatela klubo de Pola Filatela Asocio kun elstara retejo. En tiu hazarde ni trovis informojn pri apero de E-filatelaĵoj. Sube videblas la koncerna informo en pola lingvo... (kompreneble!). Originaloj ne atingis nin, ankaŭ ne klarigoj pri la stampo montrita en LVL 175, p 19. Nia Anja Laskowska klopodas akiri detalojn.

Zbigniew Wilczek aperigis ipm por la

130a E-jubileo

100a datreveno de la forpaso de Zamenhof

kaj 110 jaroj de Esperanto en BYDGOSZCZ (1908-2018).

Eldonkvanto: 126 pecoj sur 14 folioj kun po 9 ipm

Kwiecień 2017

130. rocznica powstania Języka Esperanto

110. rocznica śmierci L.Ł.Zamenhoba

110 lat istnienia Ruchu Esperanto w Bydgoszczy (1908-2018)

Szyny łączą kraje, Esperanto - narody

Zamawiający: Zbigniew Wilczek

Nakład: 126 sztuk [14 arkuszy 9] (numery arkuszy: 066628-066641)

Projekt: Waldemar Kawiński

Źródło informacji: Zbigniew Wilczek; Waldemar Kawiński

Uwagi: Nadruk na arkuszu: 130. rocznica powstania Języka Esperanto / 110 lat istnienia Ruchu Esperanto w Bydgoszczy (1908-2018) / 110. rocznica śmierci L.Ł.Zamenhoba - góra, Międzynarodowa Federacja Kolejarzy Esperantystów / IFEF - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio – dół

Ofertoj en ebay: Polaj personigitaj pm E-temaj



Ni petis nian Anja Laskowska pri klarigoj kaj ŝi klarigis!

„...Sur tiu ĉi koverta estas t. n. "neoznaczek"-poŝtmarko aĉetebla nur pere de interreto. Tiujn poŝtmarkojn vendas Pola Poŝto. Ĝi estas personigita poŝtmarko, por privata mendo. Oni povas mendi por normala aŭ registrita letero. La marko havas ruĝan kampon kaj sur la kampo ĉiu povas mendi iun bildon. Vi povas eĉ mendi propran foton aŭ foton de via infano aŭ kato ... aŭ kion vi ŝatas.

Tia poŝtmarko kostas same kiel normala poŝtmarko kaj estas valida por uzo dum unu jaro de la eldondato.

Tiu poŝtmarko sur la koverta (UNIVERSALA METODO) estos valida ĝis 9 junio 2018.

Kaj do, ĉi tiun poŝtmarkon mendis iu esperantisto aŭ neesperantisto kaj mi ne havas eblecon kontroli kiu kaj kie...”

Ni dankas al Anja! Intertempe videblis du aliaj tiaj markoj inter ebay-ofertoj... ĉiuj sur kovertoj kun la poŝta stampo de Białystok 1 kun dato 12 04 2017, sed: ne adresitaj... (tiuj du ipm validas ĝis 2 julio 2018... kaj: ili estas stampitaj tri monatojn antaŭ la apero!

Jen ni montras kopiojn... Originalojn ni ne akiris.





1970 25 09 – 27 09
Karl-Marx-Stadt / G D R
(hodiaŭ: Chemnitz)
E-renkonto de GDR-E-istoj

Kat. Nro: 755
Folio: 2x1, gumita papero
60x60mm, ruĝa kaj verda

Desegnita: R. Burmeister



2018 28.07 - 04.08
Lisbono
103a Universala E-Kongreso
40x40 mm, memglua

Blua, verda, flava sur blanka



2015 08 – 15.08
Nitro, Slovakio
88-a SAT-kongreso
70x36 mm, memglua

Ruĝa, verda sur blanka



2018 11-17 02
Havano/Kubo
9a TUTAMERIKA
KONGRESO
DE ESPERANTO
5x20 mm, memglua

Verda, nigra sur blanka




Bild-poŝtkarto de la Taŭrida Palaco en Leningrad.

Loko de la kongresa inaŭguro.

Sendita de Sergej Podkaminer, sekretario de la SAT-kongreso.



Eldonita de asocio TAKE en Wintzenheim, Francio

Nia kolego BASSO informis:

La eldonkvanto de PK estas 500 pecoj.

La eldonkvanto de IPM estas:

- por afranko Francio: 240 pecoj
- por afranko Mondo: 210 pecoj

Glumarkoj kaj bildkarto laŭ desegno de André Grossmann.



9a Universala E-Kongreso. 1913 en Bern

Nia eksredaktoro d-ro Antonio de Salvo

trovis en la numero 1913/11, p. 185, de *Ondo de Esperanto*

informon pri Esperanta filatelaĵo: poŝtan E-stampon el la 9a UK en Bern kun ekspeda datstampo de 30.VII 1913.

La poŝtkarto atingis Moskvon 20 8 1913 kaj samideanon Koslovski 29 VIII 1913 ...



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto:

ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17,00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15,00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

Bonvenon al du novaj klubaj amikoj!

Peter HOLBA: li estis unu el la organizantoj de la sukcesoplena filatela ekspozicio, okazinta en Nitro enkadre de la 101a UK.

Lia preferataj kolekt-temoj estas Esperanto kaj Zoologio. Adreso:

str. Hviezdoslavova 8 - 93401 LEVICE – Slovakio – petro.holba@gmail.com

Ernesto Alila VIART FERNANDEZ: li kolektas pm-ojn ĉiutemajn el la tuta mondo. Adreso: San Lazaro 465 apto 3, 3er piso entre perseverancia y

Campanario. Centro Habana. HABANA 2 – Kubo - ernesto76@nauta.cu

Stanislav BIESIADA, P.O.Box 599, PL 42-217 Czystochowa 17, proponas:

Mi deziras vendi mian tutan E-kolekton, en aparte elektitaj landoj / tutaĵoj.

Kontaktu min!

Saluto de nia prezidanto!

Karaj Geliganoj!

Jam je la fino de la 2017a jaro ni staras! La 12 monatoj rilate al agado de nia Ligo pasis relative trankvilaj, ĉar mi ne ĉeestis la Seulan UK-on (bedaŭrinde!) kaj neniun membro de Elf-Arek sin proponis por prezenti ĝin dum la Movada Foiro aŭ alia aranĝo pri fakaj asocioj. Tamen abunda estis la produktado de filatelaĵoj, fare de la viglaj koreaj samideanoj, el kiuj elstaras s-ro Kang Hon-gu! Via redaktoro abunde parolis kaj montris bildojn pri la aperintaj esperantaĵoj. Sed ankaŭ la japana filatelisto Haruja Maekawa ne restis senfara kaj eldonis plurajn pm-ojn kaj stampojn. Al ili nian plej sinceran dankon! Plie, dankindas alia nia membro, s-ino Anja Laskowska el Pollando, pro la helpo al ni donita por akiri la oficialan tutaĵon polan + stampojn, eldonitajn okaze de la 100a mortodatreveno de nia Majstro. Mi tre ĝojas, kiam vi, karaj liganoj, aktivas por filatelo kaj por Esperanto. Kaj nun ni pretiĝu por partopreni en la Lisbona UK: mi havas grandiozajn planojn, sed SEN VI ĈIUJ mi ne sukcesos ilin realigi. Mi atendas viajn ideojn kaj sugestojn. Havu Serenajn Festotagojn kaj ĝis la revido en la 2018a Jaro!

Filatelaĵajn salutojn, sincere Via Elda Doerfler